
# Bulgara ESPERANTISTO



6
1970

## ENHAVO

**Kunĉo Vâlev.** For la usona agreso en Hindoĉinio! . . . . . . . . . . 1
**Ĵdr.** La historia vero—kontraŭ la falsantoj . . . . . . . . . . . . . . . 2
* * * Kion oni parolis, kiam la eventoj estis ankoraŭ freŝaj kaj falsigo de la historio malfacila . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
**E. D.** Donacoj por la vjetnamaj infanoj . . . . . . . . . . . . 5
**Stojan Tanev.** Stefan Ŝkodrov . . . . . . . . . . . . . . . . 6
**Maria Ŝatova.** „Studenta Impeto" denove impetas . . . . . . . . 7
**Ĵdr.** Solenaĵo omaĝe al la Venko . . . . . . . . . . . . . . . . 7
* * * TEJO-novaĵoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8
**Veselin Hanĉev.** Beleco. Trad. Tempesto . . . . . . . . . . . . 9
**Damjan Damjanov.** (Sen titolo). Trad. V. Mitev . . . . . . . . . 9
* * * IV Internacia Konkurso de Junaj Operkantistoj . . . . . . . . . . 10
**A. Kubulnieks.** Bulgaraj amikoj por la lernejo en Ziemeri . . . . . . . 10
**Cv. Petrova.** La jarkunveno de la sofiaj instruistoj-esperantistoj . . . . 11
**Ĵeko Zaprjanov.** Unuamaja manifestacio de esperantistoj . . . . . . . . 11
**Nikola Tarakĉiev.** Fajrujo de patriotismo . . . . . . . . . . . . 12
**Nano Nanov.** Ĉiam serĉi novajn formojn de laboro . . . . . . . . . 15
**Ivan Zaĥariev.** Regiona renkontiĝo en Kazanlâk . . . . . . . . . . 15
**S. Neilande.** Por la nova esperantisto: La kakto . . . . . . . . . . 16
**St. Derlipanski.** Unu interesa projekto . . . . . . . . . . . . . 16
* * * Por la malgranda esperantisto: Kiel premi la aeron . . . . . . . . 17
* * * Tra la gazetaro

**Sur la kovrilpaĝo:**

La sovetaj soldatoj iiksas la standardon de la Venko sur la Rajhstago en Berlino

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio—1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv, Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

**ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO"**

**(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)**

**ALBANIO:** Inĝ. Cefo Fiko, R. Kongresi Përmetit 7—11/10, Tirane.

**ITALIO:** Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

**KOREO:** Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

**NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

**RUMANIO:** Miĥail Popesku, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.

**SOVET-UNIO:** Ivan Palkin, ul. Televidenija D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva M—449.

**SVEDIO:** Karl Kvist, Deje, Box 109.

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JUNIO
1970
6
JARO XXXIX

## *FOR LA USONA AGRESO EN HINDOĈINIO!*

*La homaro soife atendas ĉesigon de la usona agreso en Vjetnamio kaj paciĝo en tiu ĉi lando, kie la eksterma milito furiozas jam kelkajn jarojn. Anstataŭ tio la usonaj imperiistoj transportis la militfajron en la najbarajn landojn Laoso kaj Kamboĝo kaj renovigis la bombatakojn super Demokratia Respubliko Vjetnamio. La nokton antaŭ la unua de majo kelkaj divizioj de Usono kaj milittrupoj de iliaj Sajgon-lakeoj — entute pli ol 50 000 soldatoj — transiris la landlimon de neŭtrala Kamboĝo kaj lasas post si milojn da mortigitaj pacaj civitanoj, detruitajn kaj bruligitajn loĝlokojn, dezertigitajn kampojn. Jam super la tuta Hindoĉina Duoninsulo pendas la nigra ombro de la milito, de la detruado, personigita en la multsteia standardo de Usono.*

*Delonge la usonaj imperiistoj kaj la registaro de Usono malamas Kamboĝon. Tiu ĉi lando al ili ne plaĉas pro sia politiko de neŭtraleco, nacia sendependeco kaj solidareco kun la aliaj popoloj de Hindoĉinio, kun kiuj dekjarojn ĝi batalis kontraŭ la jugo de la francaj kaj japanaj koloniigistoj. La usonaj imperiistoj deziras, ke Kamboĝo fariĝu ilia nov-kolonio, militbazo kontraŭ la popoloj de Hindoĉinio kaj helpanto en la perfidaj projektoj de Nixon bataligi azianojn kontraŭ azianoj profite al la usona imperiismo. Jen tial la usona registaro helpis la plej reakciajn fortojn en Kamboĝo fari regrenverson je la 18 de marto j. k. La laŭleĝa registaro de Norodom Sihanuk estis renversita, malgraŭ ke ĝi havis la amon kaj la fidon de la popolamasoj. Sed la popolamasoj leviĝis kontraŭ la reakcia puĉo. Kaj la usona armeo invadis la neobeeman landon por helpi siajn lakeojn.*

*La intensigo de la agreso de Usono kontraŭ la popoloj de Hindoĉinio estis renkontita kun kolero kaj indigno de la tuta demokratia homaro. La reago ankaŭ en Usono mem estas tre akra. Kreskas la izoliĝo de Usono sur la tutmonda areno. Kreskas la malfido kaj malamo de la aliaj popoloj kontraŭ Usono — ili pli kaj pli reale konvinkiĝas, ke al Usono oni ne povas fidi, kiam ĝi akceptas devigojn antaŭ la tutmonda socieco, ke Nixon nur ŝatas paroli pri paco kaj pri nova erao de intertraktoj, sed samtempe li plifortigas la streĉitecon en la internacia vivo.*

*Ĉiam pli multe da homoj en la mondo konvinkiĝas, ke Usono fariĝas plej kruela ĝendarmo, kiu barbare frakasas ĉiuloke kaj ĉies batalon por libero, socia justeco kaj nacia sendependeco.*

*La plivastigo de la usona agreso en Hindoĉinio devigas ĉiujn demokratiajn, kontraŭimperiismajn kaj pacamajn fortojn, sendepende de diferenco en iliaj socipolitikaj, kulturaj kaj religiaj konceptoj, plifortigi sian unuecon. La agresanto devas renkonti komunan reziston kaj devas esti ĝustatempe enbridita.*

*La bulgara popolo, kies historio estas senĉesa vico de bataloj por nacia libereco kaj sendependeco, plene simpatias la justan batalon de la hindoĉinaj popoloj. Ĝi estas firme konvinkita, ke tiuj popoloj finfine venkos kontraŭ la usonaj sklavigantoj kaj ties lakeoj. En urboj kaj vilaĝoj, en entreprenejoj kaj oficejoj — ĉie en nia lando estas kolektataj miloj da subskriboj, organizataj amasaj kunvenoj kaj mitingoj kontraŭ la usona agreso en Hindoĉinio. La esperantistoj partoprenas ilin. Ili organizas ankaŭ apartajn protestajn kunvenojn, sendas protestajn leterojn al la usona ambasado en Sofio. Nia registaro faris kategorian deklaron defende al la hindoĉinaj popoloj, esprimante la pretecon de nia popolo doni plenan moralan kaj materialan helpon al ilia justa batalo.*

*Ĉi-jare la tuta homaro festas 25 jarojn de la venko super la faŝismaj landoj, kiuj estis starigintaj la celon neniigi la unuan socialisman ŝtaton en la mondo — Sovetunion, konkeri la tutan mondon kaj ĉesigi la socian progreson. Hodiaŭ la homaro ankoraŭ pli severe avertas la novajn pretendantojn por monda regado — la usonajn imperiistojn, ĉesigi siajn planojn por bruligo de lokaj militoj kaj preparado de nova, tria tutmonda milito. La militfajrujoj en Hindoĉinio kaj en la Proksima Oriento, senĉese disblovataj de Usono, tenas vigla la atenton kaj la pretecon de la popoloj batali kontraŭ ĉies ajn agreso kaj precipe kontraŭ la usona agreso — por konservi la pacon, la vivon.*

*Vivu la justa batalo de la hindoĉinaj popoloj por libero kaj nacia sendependeco!*

*For la usona agreso en Hindoĉinio!*

---

**La 13-an de majo j. k. forpasis en Aŭstrio**

*ANTONIO BALAGUE*

**aktiva kontraŭfaŝisto kaj esperantisto, fondinto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj longjara ĝia sekretario.**

**Niajn kondolencojn al liaj familianoj kaj amikoj!**

---

*LA BULGARA ESPERANTISTARO FUNEBRAS PRI K-DO BALAGUE*

La Bulgara Esperantista Asocio kaj la Bulgara MEM-Komitato sincere funebras pri la forpaso de la bone konata ankaŭ en nia lando k-do Antonio Balague, longjara ĝenerala sekretario, iniciatinto kaj fondinto de MEM.

Al liaj familianoj ni esprimas nian kondolencon kun la firma espero, ke MEM daŭrigos la vojon markitan de k-do Antonio Balague.

Niaflanke ni donos nian helpon por la triumfo de la ideoj de MEM.

| SEKRETARIO DE BULGARA MEM-KOMITATO: | PREZIDANTO DE BEA: |
|---|---|
| *Iv Canev* | *N. Aleksiev* |

# *LA HISTORIA VERO — KONTRAŬ LA FALSANTOJ*

Lastatempe precipe en Usono, Anglio kaj Germana Federacia Respubliko abundas intencaj falsadoj de sendubaj faktoj pri la Dua Mondmilito. La celo estas: kaŝi de la homoj, de la juna generacio la veron pri la milito.

Greenfield (Grinfild) asertas: „Per la komenciĝo de la Dua Fronto Germanio estis kore frakasita kaj estiĝis la returna etapo en la milito". Falsaĵoj troveblas en verkoj de Baldwin Zimke (Balduin Cimke), Klark Erih (Eriĥ), Kubi, Joung (Jang) k. a. La usona historiisto Soulsbury (Solsbâri) „pruvas", ke „La Soveta Armeo venkadis ne per scipovo, sed per plurobla nombra supereco". Faŝistoj en la libro de la anglo Lidelle Gart (Lidel Gart) rememoras: „Hitler malvenkis pro malsukcesoj en bataloj kontraŭ Anglio. . . Nin haltigis la vetero, ne la rusoj."

Ĉu tio estas la vero, tamen?

Mem la ĉefo de la stabo de hitleraj terarmeoj generalo-kolonelo Halder la 30-an de junio 1940 notas en sia taglibro: „Ĉefan atenton — al Oriento". Kaj la 31-an de julio 1940 li strategie pritaksas la situacion: „Norvegio — 7 divizioj, en Francio — 50 divizioj, Belgio kaj Nederlando — 3, entute 60 divizioj. Al Oriento (... kontraŭ USSR) — 120 divizioj". La 12-an de oktobro 1940 li notas: „La ĉefstabo decidis rezigni operacion „Mara Leono" (kontraŭ Anglio) kaj dediĉi ĉefan atenton al USSR".

Ni preterpasus la ridindan klarigon pri malvenko de la faŝistoj pro „rusa generalo vintro", „generalo koto". Eĉ analfabeto scias, ke je fronto militantoj troviĝas ĉe egalaj veterkondiĉoj. Sed ni ne forgesus la „asertojn", ke bataloj ĉe El Alamejn en Nord-Afriko (ne apud Stalingrado!) estiĝis terurna etapo de la Dua Mondmilito.

Kaj la vero?

Jen ciferoj de la karakterizaj indicoj, kaj oni mem konkludu. Ĉe Stalingrado: fronto longa 700 km; homoj — 1 005 000 sovetaj, 1 100 000 faŝistoj; tankoj — 894 sovetaj, 675 faŝistaj; kanonoj — 13 540, resp. 10 300; aviadiloj — 1115, resp. 1216. Ĉe El Alamejn: fronto — 65 km; homoj — 2 700 000 angloj, 190 000 faŝistoj; tankoj — 1300 anglaj, 510 faŝistaj; kanonoj — 1200, resp. 600; aviadiloj — 1200, resp. 300 faŝistaj. Faŝistaj perdoj ĉe Stalingrado: 1 450 000 homoj (dum la ofensiva periodo — 840 000), pli ol 2000 tankoj, 10 000 kanonoj, 2000 aviadiloj, 70 000 aŭtomaŝinoj. Ĉe El Alamejn faŝistaj perdoj: 33 000 homoj, 300 tankoj, kelkcentoj da kanonoj.

Do, en la strategia plano de la Dua Mondmilito la batalado ĉe El Alamejn (ĝi estas granda evento por la angla armeo) estas infana ludo kompare al la giganta duelo ĉe Stalingrado.

Usona milithistoriisto E. Simke (E. Zimke), okcidentgermanaj publicistoj W. Hubatsch (V. Ĥubaĉ) kaj Eckkel (Ekkel), usonano Rayan (Rajan) k. a. malsukcese „pruvas", ke decidigaj bataloj dum la Dua Mondmilito okazis en Nord-Afriko, Mediteraneo kaj eĉ en Malproksima Oriento, ke ne la Orienta, sed la Okcidenta Fronto estis decidiga.

La komenciĝinta je la 6-a de junio 1944 operacio „Overlord" (La Dua Fronto) estis la plej granda militago de la okcidentaj aliancanoj. Ĝi minacis la postfronton de Germanio. Sed ĉi tie la nombra supereco de l' aliancanoj kontraŭ la faŝistoj estis kolosa: 2 800 000 aliancanoj kontraŭ 700 000 germanoj, 15 000 tankoj kontraŭ 800 germanaj, 13 000 aviadiloj kontraŭ 500 germanaj. Tamen aliancanoj troviĝis en danĝera situacio kaj mem Churchil (Ĉârĉil) petis helpon de Stalin. Responde al tiu peto la Soveta Armeo antaŭtempe ofensivis, kaj Hitler tuj retiris el Francio avangardulajn diviziojn por la Orienta Fronto. Do, eĉ dum plej danĝeraj bata-

loj ankaŭ Hitler taksis la Okcidentan Fronton kiel akcesoran, duagradan, neesencan direkton en la tuta milito.

Jen ankaŭ la parolo de la ciferoj: Soveta-Germana Fronto — longa de 3000 ĝis 6200 km, Okcidenta — ĝis 840 km, en Nord-Afriko kaj Italio — ĝis 350 km. Ĉe Orienta Fronto ambaŭflanke samtempe militis 8,4 ĝis 12,2 milionoj da homoj, 48 800 ĝis 153 000 kanonoj, 3200—15 400 tankoj, 5000 ĝis 16000 aviadiloj. Kaj preskaŭ dum la tuta milito la proporcio de la fortoj estis 1 : 1. Ĉe la Okcidenta Fronto en plej grandaj bataloj aliancanoj partoprenis per 2,8 milionoj da homoj kontraŭ 800 000 germanoj.

Eĉ dum la ferma etapo de la milito ĉe la Orienta Fronto estis germanoj: 3 100 000 soldatoj, 4000 tankoj, 2000 aviadiloj, dume ĉe la Okcidenta Fronto: 700 000 soldatoj, 1000 tankoj, 1750 aviadiloj. Ni ne menciu, ke Okcidenta Fronto ekzistis nur 338, kaj la Orienta — 1418 tagnoktojn.

Nu, laŭ kia rajto okcidentaj „historiistoj“ provas malgravigi la decidigan kontribuon de USSR por la militakiro de la Venko? El 783 neniigitaj divizioj de la faŝisma alianco 607 estis neniigitaj ĉe la Orienta Fronto. El 13 600 000 viktimoj de faŝisma Germanio 10 500 000 (76%) falis ĉe la Orienta Fronto. Mem la komendanto de l'usona terarmeo generalo Stillwell (Stiluel) antaŭ mitingo en New Jork (31. I. 1945) deklaris: „La tutmonda civilizacio devas speciale ŝati la meritojn de la centra figuro en la milito — la rusa soldato.“

Tiu ĉi „centra figuro“ faris legendajn heroaĵojn, kiujn nur fantazio povus imagi. La soveta soldato estis la standardisto de la Venko. Sed post la milito naskiĝis aŭtoroj, kiuj perfidas la veron. Ili emas forgesi ankaŭ la militestran talenton de la sovetaj komandantoj, kiu kreis 10 defendajn kaj 40 ofensivajn operaciojn kiel la Moskvan, Stalingradan, ĉe la Arko de Kursk, la Berlinan k. a. Ilin ankaŭ nun pristudas usona kaj aliaj armeoj kiel ekzemplon de milita arto.

Kaj kion ni diru pri la nekalkuleblaj materialaj perdoj de USSR, pri la 20 milionoj da sovetaj pereintoj (775 000 angla-usonaj!)? Pri la partizana movado de 1 miliono da homoj en la okupitaj teritorioj de USSR, kiu movado neniigis 300 000 germanajn soldatojn jam en la daŭro de la unua militjaro)?

La objektiva historia evoluo posedas feran logikon. La venko en 1945 signifis neniigon de la faŝismo kaj starton por novaj venkoj kontraŭ ĉiaj malamikoj de la homaro, kontraŭ ĉiaj estontaj militkaŭzantoj. Sub la gvido de Lenina Komunista Partio la Soveta Armeo neniigis la faŝismon kaj savis la homaron. Okazis tutmonde gigantaj socipolitikaj, ekonomiaj kaj militaj ŝanĝoj. Pruviĝis la fakto, ke la socialismo estas nevenkebla, ke la imperiismo, ĉefe la usona, estas unuanura fonto de danĝero kontraŭ la nuntempa socio, ke agresanton oni ĝustatempe devas enbridigi, ke ĉefa faktoro de la paco estas la potenco de Sovetunio kaj de la socialisma tendaro en unueco kun ĉiuj revoluciaj kontraŭimperiismaj fortoj. Pro tio la Varsovia Kontrakto estas objektive kaj historie necesa. Plej freŝa pruvo pri la graveco de tiu fakto estas la propono de la ŝtatoj, kiuj formas ĝin, pri baldaŭa organizado de konferenco de ĉiuj ŝtatoj en Eŭropa Kontinento pri starigo de sistemo de tuteŭropa sekureco. Tio estas gravega propono en la intereso de ĉiuj eŭropaj landoj, sendepende de ilia socia reĝimo, ĉar ĝuste el Eŭropo dufoje ekbrulis grandegaj tutmondaj militoj.

Kaj se ni serĉos la respondon al la demando, al kiu estas necesa hodiaŭ falsigo de la vero pri la historia venko de Sovetunio en la Dua Mondmilito, ni povas trovi ĝin en la kontraŭsovetia politiko de Usono, GFR, Britio k. a. imperiismaj landoj, kiuj serĉas novan vojon por sukcesa milito kontraŭ USSR.

*Ĵdr*

## KION ONI PAROLIS, KIAM LA EVENTOJ ESTIS ANKORAŬ FREŜAJ KAJ FALSIGO DE LA HISTORIO — MALFACILA

*En malfacila batalado, preskaŭ sola kontraŭ la faŝismaj armeoj, Rusio spertis la tutan forton de l' germana atako kaj eltenis.*
*Angla feldmarŝalo* MONTGOMERI

*En la mondo mankis forto . . . kapabla neniigi la germanajn armeojn . . . kaj tion faris la rusa Soveta Armeo.*
CHURCHIL (ĈÂRĈIL), 2. VIII. 1944

*Nedisputebla estas la fakto, ke la germana soldato renkontis la plej rezisteman kaj obstinan barilon — la sovetan soldaton.*
*Germana faŝista gazeto* „VÖLKISCHER BEOBACHTER—*junio 1941*

*En 1942 Stalingrado estiĝis returna etapo en la Dua Mondmilito. Por Germanio la batalo apud Stalingrado estas en ties historio la plej granda malvenko, por Rusio — ties plej glora venko.*
*El la libro de la germana generalo* DÖRo (DJOR) *„La marŝo al Stalingrado"a*

*La grandegaj heroaĵoj de la Ruĝa Arme en Eŭropo gajnis la admiron de la tutmondo . . . Kiel soldato, observanta la batalojn de la Ruĝa Armeo, mi sentas plej profundan admiron pro la militmajstreco de ĝiaj gvidantoj.*
*Generalo* EISENHOWER (AJZENĤAUER)

*Jen finiĝis la germana subpremado al la norvega popolo. En tiu ĉi feliĉa tago mi esprimas mian personan kaj de l'norvega popolo admiron kaj dankon al la popoloj de Sovetunio pro la brila batalado.*
ĤOKON VII, *reĝo de Norvegio*

*Sovetunio bataladis per armiloj precipe de propra produktaĵo.*
*Prezidanto* FR. ROOSEVELT (RUZVELT) *majo 1944*

*La soveta armilaro estis altkvalita eĉ en 1941. La artilerio — bonega, la pafiloj — pli modernaj kaj pli rapiĉe funkciantaj ol la germanaj. Ilia tanko T-34 estis la plej bona tanko en la mondo.*
*Faŝista generalo* KLEIST (KLAIST)

*Niaj nepoj, legantaj lernolibrojn de historio, rememoros la pasintecon, plenplenaj de admiro kaj dankemo al la heroaĵo de l' granda rusa popolo.*
ANTONY EDEN (ANTONI IDAŜN), *ministro de eksterlandaj aferoj de Britio, 1942*

*La marksisma-leninisma filozofio, la diplomatia analizo, antaŭvidanta politikajn, militajn, ekonomiajn kaj sociajn faktorojn, kaj. . . la revolucia edukado de l' specialistaro . . ebligis al la rusoj krei treege efikan strategion kaj taktikon.*
*Franca generalo* BEAUFRE (BOFR)

*La francoj memoras, kion faris por ili Soveta Rusio kaj scias, ke ĝuste Soveta Rusio plenumis decidigan rolon por ties liberigo.*
*Generalo* DE GAULLE (DJO GOL)

*Ni dankas al la rusa ŝtato . . . por la liberigo kaj la grandanima helpo., kiu savis nin en tempo de peza malriĉeco.*
KARL RENER, *gvidanto de la provizora aŭstria registaro, 1945 j.*

---

Solene celebris Lenin-Jubileon E-Societo „Bjalistok" en Madan. Raporton faris G. Ĥarizanov—prezidanto de la Societo. Salutis la agemajn esperantistojn Jordan Jordanov — prezidanto de DK de BEA (la staranta).



---

## DONACOJ POR LA VJETNAMAJ INFANOJ

La Lernanta E-Societo „Anne Frank" kaj la Societo de „Ruĝa Kruco" ĉe la Teksa Teknikumo en Vraca sendis por la vjetnamaj infanoj multe da donacoj-ludiloj en signo de eterna amikeco.

Al la infanoj de la malproksima lando, batalanta por sia libereco, ni deziras sanon kaj feliĉan vivon.

*E. D.*

# HEROA PASINTECO

## STEFAN ŜKODROV

Li naskiĝis en 1914 j. en v. Radilovo, distrikto de Pazarĝik. Gimnazion li finis en Pazarĝik, kie konatiĝis kun la progresemaj ideoj. Kiel membro de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo) Stefan disvolvis aktivan agadon, kiu ne restis kaŝita por la reakciaj instruistoj kaj la police. Li estis forigita de la



gimnazio kaj fariĝis laboristo-ŝtonĉizisto. Baldaŭ oni elektis la saĝan kaj sindonan kontraŭfaŝiston en la distrikta komitato de RMS, iom poste — kiel ĝian sekretarion. En 1937 Stefan fariĝis membro de Bulgara Komunista Partio.

Mi bone rememoras la jarojn 1937 — 1939, kiam ni obstine batalis kontraŭ la oficialaj burĝaj gvidantoj de la sindikatoj en Pazarĝik kaj fine sukcesis forpeli ilin el la laborista medio. Kune kun la klasa politika kaj ekonomia batalo ni disvolvis ankaŭ vastan kulturkleriĝan laboron por plialtigi la ĝeneralan kulturan nivelon de la laboristoj. Ni zorgis ne nur por la laboristaro de urbo Pazarĝik, sed ankaŭ por la tuta distrikto.

Stefan partoprenis plej aktive kaj sindone tiujn ĉi batalojn kaj laborojn. Samtempe li regule sendis al ĵ. „Zarja" korespondaĵojn pri la vivo kaj batalo de la laboristoj en distrikto Pazarĝik.

En 1937 j. Ŝkodrov ellernis la Internacian Lingvon Esperanto kaj kun granda entuziasmo eklaboris ankaŭ sur tiu ĉi kampo. En 1940 j. li kun k-do Sotir Vasilev estis tre feliĉa viziti la kongreson de la bulgaraj esperantistoj en urbo Loveĉ.

Venis la pezaj jaroj de la Dua Mondmilito. Multaj popoloj eksuferis sub la boto de la germana hitlerismo. Sub la jugo de germanaj kaj bulgaraj faŝistoj ekĝemis ankaŭ nia popolo. Komenciĝis la peza kontraŭfaŝista batalo ĉefe kun la granda soveta popolo. Kiel fidela filo de nia laborpopolo kaj de BKP Ŝkodrov ĵetis sin en la fajron de la batalo kun vortoj kaj faroj. Li estis membro de sekreta batalgrupo, provizis diversajn necesaĵojn al la partizana taĉmento, kaŝis partizanojn kaj eksterleĝajn aktivulojn de BKP kaj RMS.

Heroe falis en pafbatalo apud montosupro „Eleĝik" inter la partizana taĉmento „Koĉo Ĉestimenski" kaj la monarkofaŝisma ĝendarmaro lia nevo Ljuben Ŝkodrov, amato de la tuta laborista junularo. Lamentis la koro de Stefan — ja tiel arde ankaŭ li amis sian nevon. . . Kaj li ankoraŭ pli sindone partoprenis la batalon kontraŭ la tiranoj. Sed la printempon de 1944 j. li estis arestita. Post dudektagaj torturoj la kruelaj faŝistaj ĝendarmoj lin mortigis la 14-an de aprilo. Tiel pereis en la batalo por justo kaj libero nia kara kamarado kaj samideano Stefan Ŝkodrov.

La eterne dankema libera popolo nun donis lian nomon al unu el kvartaloj de urbo Pazarĝik.

*Stojan Tanev*

# JUNA ESPERANTISTO

## BULGARA E-JUNULARO (BEJ)

**NEJO-Fako.** La Sekretariaro de BEJ donas grandan atenton al la NEJO-Fako (Fako por neesperantistaj junularaj organizaĵoj). La konsisto de NEJO-Fako estas kvinmembra. La projekto por agadplano estas preparata en la Sekretariaro kaj kunlabore kun la NEJO-Komisiono de TEJO. Jam realiĝis jenaj aktivecoj: kontaktoj kun CK de Komsomolo (DKMS), kunlaboraj ligoj kun lokaj DKMS-komitatoj en superaj sofiaj lernejoj kaj institutoj, BEJ-partopreno en oficialaj solenaĵoj kaj teoriaj konferencoj omaĝe al la glora 100-jara jubileo de Lenin.

**Turisma Fako.** Ĝi startas al agado en trimembra konsisto kaj havas Planon por laboro ĝis la fino de 1970. Oni diskonigis la kalendaron de la Turisma Servo de TEJO por 1970 inter la lokaj grupoj per aparta cirkulero. Ekzistas kontaktoj kun la TS de TEJO kaj kun la Buroo por Internacia Junulara Turismo kaj Feriado — Sofio.

## „STUDENTA IMPETO" DENOVE IMPETAS

Ĉi-jare la juna esperantistaro en Plovdiv estis riĉigita per novaj fortoj. Tion pruvis la jarkunveno de SES „Studenta Impeto", okazinta la 18-an de marto. Gastis inĝ. B. Leonov — prezidanto de STELO kaj sekretario de BEJ, k-do L. Karakaŝev — el DK de BEA, Plovdiv. Post la jarraporto okazis diskutoj pri la ĝisnuna kaj estonta agado.

Oni unuanime elektis novan estraron: prezidantino — Fani Miĥajlova, sekretariino — Petja Ĥristova kaj membro — Dimitr Slavov. Post la jarkunveno ekfunkciis E-kurso kun gvidantino Jana Puleva, ĝin partoprenas studentoj el ĉiuj institutoj de Plovdiv.

En Karlovo, okaze de la 100-jara jubileo de Lenin, la 4-an de aprilo okazis en la Kulturdomo solenaĵo, organizita de DEK - Plovdiv, Popola Legejo „V. Levski" kaj E-Societo „V. Levski" — Karlovo. Interese prelegis inĝ. B. Leonov je temo „La marksismo-leninismo pri la evoluo de la lingvoj kaj la mondlingva problemo". Poste oni prezentis E-programon dediĉitan al Lenin. Okazis junulara balo.

Sekvintan tagon ni vizitis historiajn vidindaĵojn kaj naturajn belaĵojn ĉirkaŭ Karlovo kaj Sopot. Ĉiuj restis tre kontentaj. Ni invitas junajn esperantistojn el la tuta mondo skribi al ni: Plovdiv, P. K. 151, SES, Bulgario.

*Maria Ŝatova*

## SOLENAĴO OMAĜE AL LA VENKO

En 1970 la dankema homaro solene celebras la 25-an datrevenon de la Venko super la faŝismo. Ankaŭ la sofia junularo celebris tiun gloran eventon.

Ĝuste la Tagon de la Venko — la 9-an de majo — Bulgara Esperanto-Junularo, Sofia Studenta Esperanto-Societo „Vela Peeva" kaj la DK de BEA — Sofio, aranĝis grandan Vesperon de la Venko. En la Studenta Kulturklubejo ĉe la Sofia Universitato „Kliment Oĥridski" antaŭ multnombra publiko de bulgaraj kaj eksterlandaj studentoj kaj civitanoj ekstaris k-do Ĥristo Gorov — vicprezidanto de BEA, kiu parolis pri la historia venko super la faŝismo, pri la decidiga kontribuo de Sovetunio kaj akre kondamnis la militon de Usono kontraŭ la popoloj de Hindoĉinio. Post lia festparolado k-do Ivan Canev, sekretario de la Bulgara Sekcio de Mondpaca E-Movado (MEM), per konvenaj vortoj malfermis la kampanjon por kolektado de subskriboj sub la Alvoko de la V-a Stokholma Konferenco por Vjetnamio (27—30. III. 1970). Lili Ivanova, membro de la Sekretariaro de BEJ, legis protestan telegramon al la prezidanto Nixon pro la brutala agreso de Usono en Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo. La publiko aplaŭde aprobis la telegramon.

Sekvis belarta programo. La belaj programanoncantinoj Violeta Duparinova kaj Margarita Belĉeva laŭvice prezentis jenajn erojn: „Kanto pri la ŝtorma birdo" (Maksim Gorkij) — recitado de Bojka Batalska; „Nuancoj de nia amo" — belega recitado laŭ verkoj de Penju Penev kaj Maksim Gorkij, akompanata de muziko el Bach, Wagner, Ĉajkovskij, Ŝostakoviĉ, R. Kor-

*Parolas k-do Gorov*





*Anoncas la kampanjon por kolektado de subskriboj k-do Ivan Canev*

sakov — plenumanto Vladimir Rusev, studento; „Historio" — versaĵo de N. Vapcarov — recitis la konata juna aktoro Stefan Dimitrov. Fine longdaŭran aplaŭdon rikoltis la komedio „Familia Matĉo" en plenumo de la amataj aktoroj-esperantistoj el Bulgara E-Teatro Belka Beleva kaj Anani Anev. Al ĉiuj enmanigis florojn studentinoj el SSES „V. Peeva".

La solenaĵo daŭris per muziko, ĝojaj distriĝoj, gaja temperamenta dancado. Karaj gastoj — lernanta grupo el Vraca kun gvidanto Georgi Marinov, amikiĝis kun la sofia E-junularo. V. Ivanova k. a. el Vraca plenumis versaĵon,

*Gestudentoj-aktivuloj, organizantoj de la Vespero*



bulgarajn popolkantojn, estradajn kantojn. Okazis riĉa loterio, dancsurprizoj, interesa viktorino, konkurso pri moderna dancado, kiun gajnis Jovko Ŝoŝev kaj lia amikino Elena, kaj Lili Ivanova kaj Plamen Batalski.

Multe kontribuis por la sukceso de la festvespero ankaŭ S. Damjanova, V. Vrangalova, S. Donĉev, A. Rusev, E. Petrov, J. Rabotov, I. Cvetanov, A. Ŝumski k. a. Menciinda estas la helpemo kaj financa subteno de Distrikta-Urba Komitato de BEA. Pri la aranĝo informis Radio-Sofio kaj lokaj gazetoj.

*Ĵdr*

*La amataj artistoj de BET B. Beleva kaj A. Anev majstre ludas*



# TEJO-novaĵoj

● Dum aŭgusto 1970 en Baŝkirio okazos la XII Soveta Esperantista Junulara Tendaro. Dum la pasintjara tendaro estis organizitaj Somera Universitato, ekskursoj, koncertoj, seminario por aktivuloj k. a. Gvidanto Anatolij Gonĉarov. Estis akceptita ankaŭ Regularo de SEJM (Soveta Esperantista Junulara Movado) kaj Komitato kun prezidanto Vitautas Ŝilas. En la Konsilantaron — la supera organo de SEJM — eniras reprezentantoj de 47 kluboj. La Transiran Zamenhof-Pokalon gajnis la plej aktiva klubo en urbo Ufa.

## BELECO

de *Veselin Ĥanĉev*

Tiom vin mi serĉis,
ke la tero
eksimilis
tuta vin.

Tiom vin mi volis,
ke mi nomis
ĉiun mian aĵon
nur per via nom'.

Ĉu ekzistas vi?
Aŭ mi vin elpensis?

Eble estas ĝi pli bone tiel.
Eble, elpensita,
plej longdaŭre estos vi kun mi,
vin plej lasta
ekmalamos mi,
plej kruele
ekdoloros min,
se hazarde
por minuto sole
per alio
mi anstataŭigos vin.

El bulgara: *Tempesto*

## * * *

*Damjan Damjanov*

— Ŝi iris for! — la vento siblas.
Kaj mankas vento . . .
— Ŝi iris for! — forflugas birdoj.
Kaj mankas birdoj.
— Ŝi iris for! — la suno ĝemas.
Kaj mankas suno.
— Ŝi iris for! — la mondo brulas. . .
Kaj mond' malaperas.
— Ŝi iris for! — la koro frapas.
Kaj ĉesas frapi.
— Ja ŝi revenos! — la vento kantas.
Kaj estas vento.
— Ja ŝi revenos! — revenas birdoj.
Kaj estas birdoj.
— Ja ŝi revenos! — la suno brilas.
Kaj estas suno.
— Ja ŝi revenos! — la mond' jubilas.
Kaj mond' ekzistas.
Nur la koro silentas
ridigita en sia atendo!

El bulgara: *Venelin Mitev*

---

● Itala Esperanto-Junularo eniris la grupon de landaj sekcioj (LS), kiuj komune eldonas la bultenon „Koncize" (nome: belga, franca, germana kaj nederlanda LS de TEJO).

● En la junulara elsendo de Radio Sarajevo „Radio por la Junaj" okazis pluraj prelegoj de H. Tonkin, A. Maitzen, H. Bakker, M. Dobrzynski, Senad Ĉoliĉ, I. Muramacu, C. Nourmont, S. Johansson, Z. Tiŝljar, F. Simonnet k. a. aktivuloj de TEJO pri du temoj: „Junularo kaj Socio" kaj „La Mondo en la Kosma Erao".

● La Komisiono de Itala E-Junularo ellaboris kaj disvastigas novan agadplanon kaj socian idearon de la E-junularo en Italio. La Seminario de IEJ en Milano decidis: "IEJ devas pli aktive partopreni la ĝeneralan junularan movadon."

● Nun en TEJO nombras 23 landaj sekcioj kun 12 000 junuloj-esperantistoj.

● De marto ĝis oktobro 1970 okazos 26 junularaj aranĝoj — internaciaj kaj tutlandaj — kun kultura, labora, turisma kaj alia karaktero. Fakte ĉiumonate okazos ie tra la mondo junulara E-renkontiĝo.

● „TEJO kaj vi" estas nova informa broŝuro. 16-paĝa, provizita je fotoj, modernaspekta. Reeldoniĝis la varbilo „TEJO kaj la junularo esperantista".

● Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando eldonis duan legolibreton sub titolo „Niaj roluloj".

● Esperanto estas instruata en 30 universitatoj de 16 landoj. La universitatoj de Clermont-Ferant (Francio) kaj Braŝov (Rumanio) antaŭ nelonge enkondukis ĝin.

● La 13-a Internacia Seminario de GEJ en Marburg Lahn kunvenigis 70 gejunulojn el 14 landoj. Okazis prelegoj de eminentuloj pri: nuna stato de E-literaturo, principoj de oratora arto, jugoslavia literaturo, aplikado de komputiloj en lingvistiko k. a. La seminario havis ĝeneralan temon „Tendencoj de la literaturo de nia epoko".

● Esperanta Meksika Junularo ekaperigas propran gazeton „EMJ-Bulteno"—ĝi estas 16-paĝa, moderne ofsetita.

● La lerneja Komisiono de TEJO ellaboris Programon pri Instrupolitiko de TEJO por la periodo 1970/73, dividitan en du ĉapitroj: a) por la mezlernejaj gejunuloj kaj studentoj, b) por junpioniroj. Baza ideo — turismaj kursoj kun praktiko, kies ĉefa celo estas paroligi kaj devigi al aktiva lingvouzado la novlernintojn de Esperanto. Por apogi la Programon la Lerneja Komisiono lanĉos konkurson inter la LS de TEJO: „100 lernejoj, 1000 instruistoj, 10 000 gelernantoj". La konkurso daŭros tri jarojn — ĝis la fino de 1973.

● HEJ organizis en Budapeŝto Seminarion por junularaj gvidantoj en ĉeesto de 20 junularaj aktivuloj. La Seminarion gvidis Klara Varga kaj Flora Szabo.

# sciènco... belarto... kulturo

### IV-A INTERNACIA KONKURSO DE JUNAJ OPERKANTISTOJ

Finiĝis la IV-a Internacia Konkurso de Junaj Operkantistoj en Sofio. Bulgario, lando de tutmondaj kolcsoj en la opera belarto kiel Nikolaj Gjaurov, Boris Ĥristov k. a., varme kaj gastame akceptis ankaŭ ĉi-jare morgaŭajn majstrojn de la operscenejo el ĉiuj partoj de la terglobo. La konkurso rajte estiĝis esenca tradicia evento en internacia skalo, ĝi estis firma defendanto de la opero en tempo, kiam multaj „profetoj" taksas la operan ĝenron kiel formortantan.




*La laŭreatoj de la Konkurso (de maldekstre): Evgenij Rajkov, A. Tomova—Sintova, Antonio Blankas, Gena Dimitrova, E. Knot, M. Curfi*

La bulgara operskolo rikoltis novajn rekonojn per siaj novaj talentoj. La Internacia Ĵurio, konsistanta el alterudiciaj kaj rekonitaj specialistoj, anoncis jenajn laŭreatojn:

**Virinoj**

1) Unua premio kaj ora medalo: Gena Dimitrova (Bulgario).

2) Dua premio kaj arĝenta medalo: Ana Tomova-Sintova (Bulgario).

3) Tria premio kaj bronza medalo: Margaret Curfy (Kârfi) (Britio).

**Viroj**

1) Ne aljuĝita.

2) Dua premio kaj arĝenta medalo:
Erich Knot (Germana Federacia Respubliko);
Evgenij Rajkov (Sovetunio).

3) Tria premio kaj bronza medalo: Antonio Blankas (Hispanio).

Ĝis nova renkontiĝo, karaj amikoj — junaj operkantistoj!

## Parolas latvaj amikoj

### BULGARAJ AMIKOJ — POR LA LERNEJO EN ZIEMERI

Eksciinte, ke en aprilo nia lernejo aranĝos ekspozicion omaĝe al V. I. Lenin, en kiu ni ekspozicios ankaŭ senditajn de amikoj materialojn pri la genia gvidanto de la proletaro, bulgaroj alsendis diversajn materialojn. Minko Conkovski el Sofio sendis multajn librojn el la bulgara belliteraturo. Ni konatiĝis kun li en la XI Baltlanda Esperanto-Tendaro en Viljandi. El liaj materialoj ni eksciis pri bulgaroj-kunbatalantoj de V. I. Lenin, pri tio, ke en la bulgara poezio la temo pri Lenin, Oktobro kaj Sovetunio okupas preskaŭ la saman lokon kiel la temo pri lia patrolando Bulgario. La bulgaroj fieras pro sia nacia poezio pri Lenin.

Ankaŭ ni sendas al multaj landoj librojn pri la gvidanto de la revolucio, pri Latvia SSR, materialojn por aranĝo de memorekspozicioj pri Lenin.

Ni jam ricevis el Hungario, Pollando, Germana Demokratia Respubliko, Bulgario recenzojn pri ĉi libroj. Jen kelkaj citaĵoj el letero de la bulgara esperantisto Ĥristo Manolov:

„Kun granda ĝojo mi ricevis la senditan de vi libron. Latvio estis por mi preskaŭ nekonata lando. Nun mi jam povas diri, ke mi scias multon pri ĝi.

Mi gratulas vian eldonejon pri la bonega ideo. La mondo, des pli la kapitalista, devas koni vian landon kaj viajn strebojn al paco kaj prospero.

Ĉu viaj eldonejoj ne povus eldoni pliajn librojn en Esperanto—ilustritajn, pli detalajn rilate la kulturon, pasintecon kaj nuntempan vivon de la latva popolo?"

Dum la lastaj tagoj la lernejo en Ziemeri ricevis de la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Latvaj Esperantistoj novajn librojn en Esperanto pri Lenin kaj pri nia respubliko. Ni komencis dissendi ĉi librojn al niaj amikoj.

*A. Kubulnieks,*
*gvidanto de la rondeto „La Fajrero"*
*(El la latva jurnalo „Oktobra Karogs" — „Oktobra Standardo" — N° 34/1970)*

## ORGANIZA VIVO

### LA JARA KUNVENO DE LA SOFIAJ INSTRUISTOJ-ESPERANTISTOJ

La jara kunveno de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov" okazis la 13-an de majo en la Sofia Universitato. Prezidis k-do Vasil Bozarov— vicdirektoro de la Pedagogia Instituto ĉe la Ministerio de Popola Klerigo kaj prezidanto de la Instruista Sekcio de BEA.

La kunveno komenciĝis per belarta programo. Ljuba Bojaĝieva tralegis propran versaĵon pri Lenin, Stefan Atanasov recitis „Leteron" de Vapcarov, Tanja Rajkova kaj ŝia lernantino Renata Vasileva recitis versaĵojn de Javorov.

La raporton de la estraro pri la unujara agado de la societo legis la vicprezidanto k-do Kunĉo Vâlev. Sendubaj atingaĵoj: antaŭ 2 jaroj, kiam la societo estis fondita, ĝi havis 80 membrojn, nun — 144; dum la pasinta lernojaro ĝi organizis 5 kursojn kun 65 gekursanoj — instruistoj; ĝiaj aktivuloj helpis la organizadon de la korespondaj E-kursoj kaj varbis por ili 15 geinstruistojn; viglan agadon disvolvis la klubo de la esperantistoj-instruistoj ĉe la Centra Domo de la Instruisto — dum la jaro en ĝi okazis 37 kunvenoj kun tre interesaj prelegoj pri diversaj temoj.

En la rezolucio de la kunveno oni antaŭvidis: la societo havu kiel sian plej gravan taskon la pluan varbadon de novaj esperantistoj inter instruistoj (prefere junaj) kaj lernantoj; ankaŭ estonte ĝi helpu la agadon de la Instruista Sekcio de BEA; en la ĝeneralaj kunvenoj plimultiĝu la temoj pri metodiko, lingvo, historio de la E-movado kaj E-literaturo k. a.; plifortiĝu la organiza kaj financa disciplino ktp.

La nova estraro de la societo estas: prezidanto — Kunĉo Vâlev, vicprezidanto — Marin Bâĉev, sekretario — Jordan Markov, kasisto — Janka Daskalova, E-kursoj — Ŝiŝman Boĉev, kulturkleriga agado — Rajna Arnaudova, kulturamasa agado — Tanja Rajkova. Fine la kunveno akceptis protestan rezolucion kontraŭ la agreso de Usono en Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo.

La jara kunveno de E-societo „Diĉo Petrov" pasis sub la signo de entuziasmo kaj preteco por E-laboro.

*Cv. Petrova*



### UNUAMAJA MANIFESTACIO DE ESPERANTISTOJ

Jam kelkajn jarojn la esperantistaro en Dimitrovgrad partoprenas la unuamajajn manifestaciojn. Ankaŭ ĉi-jare ĉirkaŭ 100 gelernantoj kaj civitanoj manifestaciis en aparta kolono, kun esperantlingvaj sloganoj sur la afiŝoj: „Vivu la Unua de Majo", „Per Esperanto al tutmonda paco" k. a. La vigla marŝo de la esperantistoj el la du E-societoj „Internacia Amikeco" kaj „Flamo" kaj la aktualaj sloganoj altiris la atenton de la oficialaj personoj elsur la tribuno kaj ili sincere salutis ilin. Kaj la parolanto per la mikrofono anoncis: „Preterpasas la vicoj de la esperantistoj el la urbo — aktivaj batalantoj por paco. Ili portas afiŝojn kun sloganoj pri paco, amikeco kaj interkompreniĝo sur la tero".

La partopreno de la esperantistoj el Dimitrovgrad en la unuamajaj manifestacioj jam fariĝis tradicio. Tio faras ilin ĉiam pli popularaj kaj estimataj en la urbo.


*Ĵeko Zaprjanov*



Novaj esperantistoj en Blagoevgrad, ĵus finintaj kurson, gviditan de k-do G. Popatanasov. Inter ili sur la foto estas nia E-veterano Stanoj Georgiev Maleŝevski, G. Rasolkov — membro de CK de BEA, G. Markov — prezidanto de la urba E-societo.




La naskiĝdomo de L. Karavelov



La naskiĝdomo de T. Kableŝkov

Ĝenerala vidaĵo al Koprivŝtica



## *FAJRUJO DE*

*de Nikola*

Koprivŝtica, tiu ĉi koketa urbeto, kaŝita en la sino de monto Sredna Gora, okupas inde unu el la unuaj lokoj inter la bulgaraj urboj. Pro sia riĉa kaj glora pasinteco, por ĉiam ligita kun la naciaj bataloj de nia popolo por liberiĝo, pro la bone konservitaj altvaloraj historiaj vidindaĵoj el la renesanca arkitekturo, ĝi estas deklarita kiel urbo-muzeo. Tiu ĉi urbo-muzeo ne estas kolekto de mortaj antikvaĵoj, sed vera trezorejo, kiu parolas al la vizitantoj kaj ravas ilin per siaj vivanta historio kaj romantika situo.

Koprivŝtica estis fondita ĉirkaŭ XVI jarcento. Oni opinias, ke ĝiaj unuaj loĝantoj estis paŝtistoj, kiuj vagis tra la montaro kun siaj gregoj kaj poste elektiĝis ĉi tie kun siaj familioj. Post kelka tempo disfloris ankaŭ la metioj. Kamlotistoj, pasamentistoj, stanumistoj, lignoskulptistoj kaj pentristoj de ikonoj reklamis sian majstrecon. Iliaj varoj estis konataj al orientaj kaj okcidentaj merkatoj. Dank' al la favora klimato, al la grasherbaj paŝtejoj kaj la abunda ligna konstrumaterialo Koprivŝtica rapide progresis. La komercistoj eliris ekster la limoj de sia sklavigita patrolando, vizitis grandajn ekonomiajn kaj kulturajn centrojn, kiaj estis Vieno, Istambulo k. a., konatiĝis kun ilia vivo kaj arkitekturo, kaj ĝuste tio instigis ilin konstrui en sia naskiĝloko konstruaĵojn same tiel grandaj kaj belaspektaj. Tiel komenciĝis konkurado por konstruado de pli higienaj, oportunaj kaj hejmecaj loĝejoj kun skulptitaj plektaĵoj de la plafonoj kaj diversspecaj freskoj, kiuj atestas pri la talento de la antikvaj majstroj. La filigranaj balkonoj kun sofoj kovritaj per buntaj „halıŝta" (longharaj lankovriloj) kaj kusenoj servis por ripozo de la fa-

* „Fajrujo de patriotismo" ricevis III premion en la Literatura Konkurso de „Bulgara Esperantisto."

## *PATRIOTISMO**

*Tarakĉiev*

milioj kaj iliaj gastoj dum varmegaj somertagoj. La vestaĵo de la dommastrinoj tute diferencis de tiu de la aliaj virinoj, ĉar ĝi estis kudrita el importaj lanaj kaj silkaj ŝtofoj laŭ urba modo.

Ĉiu angulo de tiu mirinda bela loĝloko kvazaŭ rakontas pri la moroj kaj la kutimoj de niaj praavoj, kiuj dum la kvin mallumaj jarcentoj de la pezega otomana jugo fervore gardis siajn kredon, lingvon, sian nacian konscion de bulgaroj. La filoj de la nature inteligentaj metiistoj estis la unuaj popolaj instruistoj, verkistoj, revoluciuloj — senmortaj apostoloj de la libero. En Koprivŝtica naskiĝis kaj elkreskis kuraĝaj kaj fidelaj idoj, kiuj glorigis sian patrujon.


Nur kiu ne vizitis Koprivŝtica, li ne eniris la malnovan domon de la eminenta revolucia aganto kaj verkisto Ljuben Karavelov. Kun aparta respekto kaj amo oni suprenpaŝas laŭ la ligna ŝtuparo por trarigardi fotojn, leterojn kaj aliajn materialojn, kiuj respegulas la imitindan vivon de tiu patrioto.

Originala monumento de bulgara baroko, transformita al muzeo, prezentas la naskiĝdomon de la fama titano de la Aprila Ribelo Todor Kableŝkov. Ĉio tie ĉi memorigas pri la heroeco de la abnegacia batalinto, kiu sin oferis por sia turmentita popolo. Ĝis hodiaŭ estas konservita la ĉerizarba kanono, per kiu oni intencis renversi la putran tronon de la sultano, kaj la sankta standardo kun brodita surskribo „Libereco aŭ morto". La naskiĝdomo de Kableŝkov estas unu el la plej interesaj konstruaĵoj kaj unika laŭ sia stilo de tiu tempo.

En la sudorienta urboparto troviĝas, droranta en ombroplena kaj silenta korto, la domo de alia flama apostolo de la libero — Georgi Benkovski. Ankaŭ ĉi tie iam la vivo bolis kaj oni





Interno de malnova domo



Interesa tegmento de malnova domo kun majstre ĉizita „suno"

La naskiĝdomo de G. Benkovski





Malnova fontano

fandis kuglojn por la antaŭstaranta ribelo. Nun bonvenigas kaj adiaŭas vin nur la rememoro pri la tiama tempesta epoko de popola supreniro.

En Koprivŝtica estas naskita Najden Gerov, la unua bulgaro, ricevinta superan klerecon en Rusio kaj fondinto de progimnazioj en sia hejmurbo kaj en Plovdiv.

Tiu ĉi vico de sindonaj popolaj klerigantoj kaj revoluciuloj inspiris la popolamasojn leviĝi al komuna lukto kontraŭ la fremda konkerinto. Proksime de la ŝtona ponto, konstruita en 1813, kun belega volbo kaj verdiĝinta pro la tempo parapeto, antaŭ 94 jaroj klakis la unua fusilo, kiu anoncis la komencon de la libero. Tial nun ĝi portas la nomon „La unua pafilo". Tuj apud ĝi staras monumento, sur kiu estas skribitaj la nomoj de la falintaj bravuloj. La liberama kaj revolucia spirito de koprivŝticanoj klare manifestiĝis ankaŭ dum la justa, liberiga batalo por neniigo de la malamata monarko-faŝisma sociordo per la personecoj de Anton Ivanov, Jako Dorosiev, Salĉo Vasilev kaj pluraj iliaj kamaradoj, verŝintaj sian sangon por nia hela estonteco.

Surtomba monumento de D. Debeljanov



Inter la ceteraj valoraj kulturmonumentoj, kiuj menciindas kaj forte impresas la vizitanton, estas la du preĝejoj, kies sonoriloj iam rompis la silenton kaj kolektis la loĝantaron aŭdi ardajn parolojn pri la proksimiĝanta libereco. En la korto de la antikva preĝejo „Sankta Dipatrino" leviĝas ekskluzive bela verko de nia nuntempa skulptarto — la impona monumento de nia granda poeto, filo de Koprivŝtica, Dimĉo Debeljanov, pereinta en la Unua Mondmilito. La alttalenta skulptisto prof. Ivan Lazarov ĉerpis inspiron el lia emocia versaĵo pri la patrino. Kaj vere, li sukcesis krei kaj eternigi neripeteblan figuron de bulgara patrino, kiu atendas sian karan filon, kviete enpensiĝinta.

Pro la konvenaj klimataj kondiĉoj kaj la pitoreska ĉirkaŭaĵo Koprivŝtica estas preferinda ferioloko. Eterne verdaj pinarbaroj kovras la montosuprojn, kies deklivoj ĉirkaŭas tiun antikvan urbon. De la malproksimaj altaĵoj malkovriĝas neforgeseblaj panoramoj. Norde videbliĝas la serpentumanta rivero Topolnica, kiu trafluas la verdan pasejon, kaj el ĝia profundo fiere levas staturon la Balkano. La majesta naturo kaj la ĉarmaj turistobjektoj de Koprivŝtica estas fonto de sano, agrabla kaj trankvila ripozado por la laboruloj.

Niaj E-societoj estas antaŭ ĉio kulturklerigaj organizoj. Grandan parton de ilia kulturkleriga agado okupas la kulturklerigaj kunvenoj. Do, en la trimonataj planoj la societoj devas zorgeme inkluzivi temojn valorajn, aktualajn. Sed tio devas esti ankaŭ temoj variaj, interesaj. Kaj — kio estas tre grava — temoj ne nur priesperantaj, sed ankaŭ socipolitikaj, sciencaj, kulturaj, ideologiaj ktp.

Sed por variigi nian kulturklerigan agadon, inkluzive niajn kunvenojn, ni devas konstante serĉi ankaŭ novajn formojn de laboro.

Celante variigi niajn kunvenojn kaj samtempe aktivigi pli grandan parton el la membroj de nia E-Societo „Maksim Gorkij" en Sofio, lastatempe ni orientiĝis al la tiel nomataj „viktorinoj" (konkuradoj).

Jen unu ekzemplo. Okaze de la 100-jara jubileo de Vladimir Iliĉ Lenin, la 4-an de aprilo ni organizis viktorinon je temo „Kion vi scias pri Lenin kaj pri Zamenhof". Ni zorgis, ke en la viktorino partoprenu pli multe da membroj, ke ili estu prefere novaj kaj antaŭ ĉio — junaj esperantistoj. La celoj estis du: unue, konigi la vivon kaj la batalon de Lenin kaj Zamenhof al la multnombra publiko kaj, due, paroligi kaj kuraĝigi multajn societajn membrojn, plialtigi ilian lingvan nivelon.

Ni bone preparis la viktorinon. Estis formitaj du teamoj el po 5 personoj. Ĉiu ano de teamo devis respondi al 2 demandoj. La skribitaj demandoj estis metitaj en apartajn kovertojn. La teamoj sidiĝis unu kontraŭ alia. Flanke de ili sidis speciala ĵurio konsistanta el 5 personoj, kiu devis prijuĝi la respondojn per ciferoj 2, 3, 4, 5, 6, skribitaj sur specialaj kartonoj. La prezidanto de la ĵurio malfermas koverton kaj anoncas la demandon, al kiu oni devas respondi. Post la respondo ĉiu membro de la ĵurio montras antaŭ la kunveno sian pritakson, levante kartonon. Post la elĉerpiĝo de la demandoj la ĵurio sumigas la rezultojn kaj anoncas antaŭ la publiko la poentojn de ĉiu el la teamoj kaj pri la individua distingito.

Kia estis la rezulto de tiu ĉi viktorino? Ni devas konfesi, ke ni estis surprizitaj: la rezultoj estis bonegaj. Vekiĝis granda intereso ne nur ĉe la partoprenantoj, sed ankaŭ ĉe la publiko. Kaj ĉiu pli bona respondo estis vigle aplaŭdata. Ni devas diri, ke la plimulto el la partoprenintoj neniam alifoje parolis Esperantlingve antaŭ kunveno. Nun, preparinte sin anticipe, ili kuraĝis tion fari. La pasio de la konkurado obsedis ĉiun.

Fine ni disdonis al la partoprenantoj donacojn. Estis faritaj fotoj. Bona kontakto inter la teamoj kaj la publiko efektiviĝis pere de mikrofono.

Post la fino venis ĉe la estraron kelkaj personoj el la publiko, kiuj deklaris sian deziron alifoje, kiam ni organizas similajn viktorinojn, partopreni ilin.

Ni rekomendas tiun ĉi rezultodonan formon de kulturkleriga laboro al la aliaj E-societoj.

*Nano Nanov*
prezidanto de E-Societo „M. Gorkij"

---

## *REGIONA RENKONTIĜO EN KAZANLÂK*

Je la 19-a de aprilo en Kazanlâk okazis regiona renkontiĝo de l'esperantistoj el Stara Zagora, Kazanlâk k. a., dediĉita al la centjara jubileo de la granda Vladimir Iliĉ Lenin. Partoprenis pli ol 40 gesamideanoj, kiuj travivis belegan tagon, uzante nian karan Esperanton. La renkontiĝon prezidis k-do Ivan Deĉev.

Laŭ la tagordo en lernejo „G. Kirkov" k-dino Ŝinka Nikolova faris modelan lecionon kun siaj lernantoj plenaĝuloj. Temo de la leciono estis la participoj. Nikolova sukcesis montri al ni bonegan lecionon kaj ni restis ire kontentaj. Post la leciono okazis pozitivaj kaj viglaj diskutoj. Esprimis sian opinion kaj personan sperton la gek-doj N. Kolarov, Slavi Janulov, Nejko Kunev, Ĵivko Ĵivkov, Rene Jordano-

(*daŭrigo sur p. 17*)

# POR LA NOVA ESPERANTISTO

## LA KAKTO

Jam dum multaj jaroj sur mia fenestrobreto, en griza poteto, kreskas kakto. Inter la aliaj ĉambrofloroj, kies koloroj ĝojigas la okulojn, la kakto ŝajnas esti nerimarkinda. Ĝiaj pingloj dolore pikas la manojn jam ĉe la unua ektuŝo.

Pasis semajnoj, monatoj, kaj iutage mi estis surprizita — mia modesta kakto disfloris per skarlata, aroma floro singardeme aspiranta al suno. La preterirantoj haltadis ĉe mia fenestro por admiri ĝian belecon.

Pasis tempo, velkis la floraĵo, kaj ne plu iu rimarkis mian kakton. Ĝi staras silente, kvazaŭ meditante pri la homoj, al kiuj plaĉas nur ĉio efemera.

*Saulcerite Neilande*

## КАКТУСЪТ

Вече много години на моя прозорец, в сива саксийка, расте кактус. Между другите стайни цветя, чиито цветове радват очите, кактусът изглежда незабележим. Неговите бодли бодат болезнено ръцете още при първото докосване.

Минаха седмици и един ден аз бях изненадана — моят скромен кактус разцъфна с яркочервен, ароматичен цвят, който предпазливо (боязливо) се теглеше към слънцето. Минувачите спираха до моя прозорец, за да се възхитят на неговата хубост.

Мина време, цветът увехна и вече никой не забелязваше моя кактус. Той стои мълчаливо, сякаш размишлява за хората, на които се харесва само всичко краткотрайно.

Предпочитайте да казвате iutage, а не unutage, защото в случая не става дума за количество и ние не броим (един ден, два дни и т. н.), а само искаме да изразим неопределеност. В този и в подобни случаи е правилно да се използува неопределеното местоимение iu, а не числителното бройно unu: Iu homo, iu tago, iun tagon (iutage), iu fojo (iufoje) и т. н., а не unu homo, unutage и т. н., напр.: Iu patro havis du filojn — Един баща имаше двама сина. Iutage li kondukis ilin en la ĝardenon — Един ден (веднъж) той ги заведе в градината.

Ако искаме да изразим количество, брой, unu ще се запази: Mi renkontis ŝin nur unu fojon (unufoje) — Срещнах я само един път (веднъж).

*Kovo*

## UNU INTERESA PROJEKTO

*Ne estas io pli kara, pli sankta por la homaro ol la paco. Nur la paco portas efektivan prosperon al la popoloj. Sen paco ĉio estas destinita al pereo!*

*Elirante el tio, grupo da specialistoj en Sofio, frunte kun Stanimir Derlipanski, ellaboris idean projekton por konstruado de unueca hidro-irigacia konstrusistemo sur la tero kun la partopreno de ĉiuj landoj el la kvin kontinentoj.*

*La projekto antaŭvidas, ke la akvoj de la riveroj ne plu enfluu la mondan oceanon, sed estu haltigitaj en la kontinentoj mem por plene kontentigi la bezonojn de freŝa akvo — kaj tio por eterne. Estas sciate, ke la problemo pri certigo de sufiĉa akvo estas gravega por la tuta homaro. Dume ĉiujare en la mondan oceanon enfluas tute vane grandegaj amasoj da akvo — ĉirkaŭ 40 000 kubaj kilometroj! Nur per parto de tiu ĉi akvo oni povus irigacii dezertojn kiel Saharo, Atakamo, Viktorio, Taklamakano, Gobio k. a., kiuj transformiĝus en florantajn ĝardenojn. Tie, kie estas varma suno kaj akvo abunda por irigacio, eĉ sur la ŝtono aperas kreskaĵoj! Aŭ alivorte dirite: ĉiu guto da akvo sur la tero devas esti movata kaj utiligata nur laŭ la volo de la homo. La nuna dislokigo de la akvofontoj sur la tero estas vera anomalio de la naturo, kiun oni devas forigi laŭeble senprokraste, por ke la homaro ne toleru pli da domaĝoj kaj plagoj. . .*

*Per tio oni evitos la erozion de la grundoj kaj la ĉiujaran forporton en la mondan oceanon de miliardoj da kubaj metroj de fekunda grundo, tiel necesega por la nutrado de la homaro.*

*Io pli: la projekto antaŭvidas alproprigon de milionoj da kvadrataj kilometroj da grundterenoj el la monda oceano. Sur tiujn terenojn povus plivastiĝi la dense loĝantaj landoj, kiel Japanio, Ĉinio, Hindio kaj aliaj — sen militoj kaj sangverŝado!*

(daŭrigo sur p. 17)



☆

**S-ro Enfrid Malmgren (Svedio), Honora Prezidanto de UEA, post longa kaj turmenta malsano forpasis la 28-an de marto. La saman tagon forpasis ankaŭ lia edzino Linnea Malmgren.**

*Estas vere, ke por la plenumo de tiu grandioza projekto estos necesaj grandaj investoj de kapitaloj. Sed havante antaŭvide la ekonomian efekton, kiu superos la ciferon de 2000 miliardoj da dolaroj ĉiujare, kaj la solvon de multaj problemoj ĝustatempe, de kio dependos altgrade ankaŭ la paco sur la tero — la projekto indas atenton! La monrimedojn por ĝia plenumo oni trovos — necesa estas iniciato!*

*St. Derlipanski*

va, Ganka Stojĉeva, Iv. Deĉev k. a.

Post la leciono ni veturis aŭtobuse al barajlago „Georgi Dimitrov". Tie ĉi ni komune tagmanĝis, ĝuis la belegan panoramon de la ĉirkaŭaĵo, faris fotojn, kantis kaj interparolis en Esperanto. Antaŭ la majesta monumento de Georgi Dimitrov la junaj geesperantistoj el Stara Zagora prezentis artprogramon, ricevante niajn aplaŭdojn. Ĉe vesperiĝo ni revenis kontentaj kaj gajaj.

*Iv. Zaĥariev*

## *POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO*

### *Por via sciamo*

#### *KIEL PREMI LA AERON*


**Vi bezonas: ĵurnalon, liniilon**

Ni troviĝas en vasta „maro" de aero sur ĉi tiu planedo, kaj ĝi premas ĉirkaŭ ni kaj sur niaj korpoj ĉiam.

Sciencistoj mezuris ĉi tiun premon, kiun la aero produktas, kaj trovas, ke ĝi egalas iom pli ol unu kilogramon sur ĉiu kvadrata centimetro. Pensante pri la nombro de kvadrataj centimetroj sur via korpo, vi nepre volos demandi, kial vi povas movi vin tiel facile. Fakte, tio estas farebla nur pro tio, ke niaj mirindaj korpoj estas tiel aranĝitaj, ke ni nek rimarkas tiun premadon, nek iel suferas de ĝi. Efektive, se mankus la aero, ni mortus.

Facila rimedo por pruvi la ekziston de aerpremo estas la jena. Kovru liniilon per granda folio de ĵurnalo, aranĝante la aferon tiel, ke unu fino de la liniilo atingu preter la randon de la tablo, en la maniero montrita en la bildo.

Nun faligu la pugnon subite sur la liberan finon de la liniilo. La aerpremo sur la granda areo de la ĵurnalo ne konsentos esti premata tiel subite supren kaj tenos la liniilon sur la tablo tiel, ke ĝi rezistos la baton de la pugno.



**Ĉefredaktoro:** Kunĉo VÂLEV
**Redakta komitato:** Tatjana EVSTRATIEVA, Dimitr ĴDRAKOV, Dimitr MITEV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.
Korektis: Vasja Petrova Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 83-26-82

## TRA LA GAZETARO

En ĵ. **„Oteĉestven Front“** (15. XII. 1969) en la artikolo „Ĉu profunda provinco?“ la la aŭtorino M. Velikova mencias la agadon de la studenta E-Societo „Aleko“ en Sviŝtov.

En la sama ĵurnalo (20. III. kaj 23. III. 1970) — anonco pri la forestaj E-kursoj de „Vsestranni Uslugi“ en Sofio.

En la sama ĵurnalo (26. III. 1970) — en longa artikolo „Esperanto en servo de la paco kaj interkompreniĝo“ la aŭtoro Dimitr Nestorov rakontas pri la agado de la esperantistoj en Plovdiv kaj pri la Semajno de Internacia Amikeco.

Ĵ. **„Sofioter Nachrichten“** (29. I. 1970), kiu aperas en Sofia en germana lingvo, publikigas artikolon de Konstantin Fortunov, en kiu la aŭtoro rakontas pri la agado de la Bulgara Esperanto-Teatro.

En ĵ. **„Trojanski Glas“** (11. II. 1970) — informo „45 jaroj da ekzistado de E-Societo „Balkana Stelo“ en Trojan“.

En ĵ. **„Septemvrijsko Zname“** — Pazarĝik (3. III. 1970) — artikolo de Iv. Stranski pri la Internacia Lingvo Esperanto.

En ĵ. **„Balkansko Zname“** — Gabrovo (11. III. 1970) — informo de Iv. Gâmzov — „En Trjavna — novaj esperantistoj“.

En ĵ. **„Oteĉestven Zov“** — Vraca (17. III. 1970) — intervjuo kun Bojĉo Mladenov, gvidanto de Lernanta E-Societo „Verda Raketo“, sub titolo „La Verda Raketo“ sur la firmamento de Vraca“ — okaze de la jarkunveno de la Societo.

En ĵ. **„Narodno Delo“** — Varna (19. III. 1970) — informo pri E-kunveno kun prelego de M. Aleksandrova je temo „Per Esperanto ekkonu la mondon“ kun projekciado de koloraj diapozitivoj.

En la sama ĵurnalo (31. III. 1970) — informo pri la jarkunveno de E-Societo „Albatro“ en Varna.

En ĵ. **„Zarja na Komunizma“** — Loveĉ (18. IV. 1970) en rubriko „Importa humoro“ oni publikigas „Latvajn anekdotojn“, tradukitajn el Esperanto de Ilija Ivanov.

En ĵ. **„Rabotniĉesko Delo“** (26. IV. 1970) — informo, ke la Prezidantaro de la Parlamento distingis Ivan Sarafov per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado pro lia 70-jara datreveno kaj longjara socia kaj pedagogia agado.

En ĵ. **„Ŝumenska Zarja“** (16. V. 1970) — informo de Cvjatko Todorov pri la kolektado de subskriboj sub la rezolucio de la V konferenco en Stokholmo kontraŭ la agresa milito de Usono en Hindoĉinio.

En ĵ. **„Rabotniĉesko Delo“** (18. V. 1970) — korespondaĵo „La pura fonto“ — pri la oficiala inaŭguro de nova kulturdomo en v. Radotina, distrikto de Sofio, kiu portas la nomon de la konata verkisto kaj kontraŭfaŝisto Trifon Ĥristovski, „la bulgara Pavel Korĉagin“. Ĥristovski estis ankaŭ sindona esperantisto (vidu la artikolon de N. Aleksiev en „Bulgara Esperantisto“ № 2/1970). En la korespondaĵo oni mencias, ke en la nomo de Bulgara E-Asocio salutparoladon faris Trajana Ivanova.

En № 5 de la monata revuo **„Bulgara Ĵurnalisto“** aperis longa artikolo de Nikola Aleksiev pri la riĉa kaj arda ĵurnalista agado de la esperantisto Trifon Ĥristovski, mortinta en 1944 j.

En ĵ. **„Oteĉestven Zov“** — Vraca (23. V. 1970) — informo, ke je la 22-a de majo en solenaĵo de la Centra Konsilantaro de Scienc-teknikaj Asocioj oni distingis k-don Bojĉo Mladenov, bulgara delegito pri astronaŭtikio ĉe UEA en Rotterdam, Nederlando, per la ora insigno de la Bulgara Astronaŭta Societo pro lia longjara aktiva agado kiel lektoro pri kosmonaŭtiko. Li faris pli ol 500 prelegojn en nia lando kaj eksterlando.

---

## Italoj lanĉas kongreson surmare

Kongres-organizantoj kelkfoje trovas, ke estas tre malfacile loĝigi ĉiujn kongresanojn en hoteloj sufiĉe proksimaj al la kongresejo. Kiam Itala E-Federacio komisiis la organizadon de la 41-a Itala Kongreso de Esperanto al la Esperanto-Grupo en Torino, la grupo elpensis originalan solvon de tiu problemo. La kongresejo — kaj samtempe loĝejo — por la kongresa semajno 19—26 de septembro 1970 estos la granda pasaĝera ŝipo „Caribia“. Kongresanoj rajtos enŝipiĝi en Genova, en Cannes, en Barcelona aŭ en Palma de Mallorca. Krome la „Kongres-urbo“ vojaĝos al Bizerte (Tunisio), Palermo kaj Capri (Napoli). Klimatizitaj kajutoj, 27 kunvenejoj, 3 restoracioj, 3 orkestroj kaj 4 naĝejoj agrabligos la restadon kaj programon.

## *KEA invadas la telefonlibrojn*

Instigite de letero aperinta en la revuo „Esperanto“, Kanada E-Asocio komencis kampanjon por menciigo de la Internacia Lingvo en telefonlibroj tra la tuta lando. La celo estas, ke en ĉiu urbo personoj, kiuj ekinteresiĝas pri Esperanto, povu tuj kontakti kun Esperanto-klubo aŭ delegito de UEA telefone kaj ricevi la deziratajn informojn. Aldonigi la vorton „Esperanto“ kun la koncerna telefonnumero en la telefonlibro kostas malgrandan sumon jare, kaj ĝia utilo povas esti tre granda.

*Informa Servo de UEA*